

Covid-19 havas negativajn sekvojn en la monda konsumo de nutraĵoj



Bruselo, mar 9 (RHK) Laŭ raporto de la televida ĉeno HispanTv, la timo pro la kronviruso, kiu etendiĝas tra la mondo, damaĝas la konduton de la konsumantoj, kio povus provoki mondan mankon je mezlonga tempoperiodo.

Laŭ raporto de la monda organizo pri sano (OMS) diskonigita ĉi-dimanĉe, 101 landoj jam havas kazojn konfirmitajn de la infektiĝo pro la COVID-19. En la mondo jam pli ol 105 mil personoj estas kontaktitaj kaj pli ol 3 mil estas forpasintaj.

La monda organizo pri sano instigis ĉiujn landojn, damaĝitajn aŭ ne, adopti "kuraĝajn" regulojn cele al bremsado de la infektiĝo, tiel ke laŭ oni estimas, la propagado de la viruso tutmonde estas neevitebla kaj oni devas esti preparita.

Fakte, en la landoj kie jam estas kazoj de Covid-19, la antaŭvido, kaj eĉ, nervozigo, malfido aŭ malcerteco pro la malsano, komencas damaĝi tiel ke ja oni observas mankon de produktoj ĝenerale. La ĉrankoj de multaj vendejoj kaj superbazaroj estas malplenaj.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/216331-covid-19-havas-negativajn-sekvojn-en-la-monda-konsumo-de-nutraj>



Radio Habana Cuba